

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA

INTERNACIA ASOCIO DE INSTRUISTOJ

ENHAVO: Al nia celo. — J. Krumpholtz: Ideo de J. A. Comenius pri la lingvo univarsala. — Dr. Uitterdijk: La instruado en Nederlando. — H. Al. Feri-J. Holub: Kongreso de la slava instruistaro en Praha la 9.--14. de aŭgusto 1908. — Ch. Macgregor: La salajroj de instruistoj en Skotlando. — Internacia Asocio de Instruistoj: Historio, Regularo, Kunvenoj en Dresden. — Internacia Oficejo por instruantoj de Esperanto. — Literaturo: Tipoj de eŭropaj nacioj. — Revuo de Revuoj *Pedagogické Rozhledy*

Internacia Asocio de Instruistoj (I. A. I.): Honora prezidanto: Dro E. Boirac, rektoro de la universitato, Dijon (Francujo). Prezidanto: Th. Cart, profesoro de la universitato en Paris. — Vicprezidantoj: F. Maréchal, profesoro en Leeds (Anglujo), frl. de Chalnet en Haag (Nederlando), R. Frenkel, inspektoro de gimnazio en Enisejsk (Siberio). — Sekretario: F. Durieux, direktoro de lernejo en Lille (Francujo). — Kasisto: Th. Čejka, instruisto en Bystřice-Hostýn, Moravio (Aŭstrio).

Membra kotizajo por 1 jaro 1 Sm (= 2.5 Fr. = 2.40 K = 2 sh = 2 Mk = 1/2 dol. = 1 Rb = 2.50 peset.) estu sendata per poŝta mandato aŭ ĉeko al la kasisto. — **Membroj de la I. A. I. ricevas la oficialan organon senpage.**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

REDAKCIO: *Th. Čejka*, Bystřice-Hostýn, Moravio (Aŭstrio).
ĈEFAJ KUNLABORANTOJ: *H. Alferi*, *R. Frenkel*.

KONSTANTAJ KORESPONDANTOJ.

Anglujo: Prof. Maréchal, Leeds. G. R. Mills, Blackpool.
— **Aŭstrio:** J. Krumpholtz, Bystřice-Hostýn. — **Belgujo:** F. Verbanck, St. Gilles-Bruxelles. — **Finnlando:** Samppa Luoma, Nurmijarvi. — **Francujo:** F. Durieux, Lille. A. Germaine, Troyes. — **Galicio:** J. Kaszycki, Grzegórzki-Kraków. — **Germanujo:** Prof. H. Gartelmann, Bremen. K. Schönherr, Dresden. — **Hispanujo:** Antonio López y Villanueva, prof. de normala lernejo, Múrcia. — **Italujo:** Prof. Alessandro Mazzolini, Perugia. — **Montenegrujo:** Risto M. Popovič-Čupič, Danilovgrad. — **Moravio:** J. Holub, Loučka-Nový Jičín. J. Grňa, Jevičko. — **Nederlando:** Dreves Uitterdijk, Hilversum. — **Norvegujo:** Nils Ökland, Skaare-Haugesund. — **Polujo:** Fr. Solarski, Wotuszewo. — **Rusujo:** Vlaso Kuročkin, inspektoro, Enisejsk. — **Serbujo:** Jov. P. Jovanovič, Kragujevac. — **Skotlando:** Ch. T. Macgregor, Edinburg. Thomas A. Maxwell, Lundin Links. — **Svedujo:** E. G. Risberg, Refsund. — **Svisujo:** E. Ducommun, Le Locle. G. Stroele, Neuchâtel. G. Grossenbacher, Lüsslingen.

Leterfako de la redakcio: Oni ne juĝu nian revuon sole laŭ tiu ĉi unua kajero. Ĝi tute ne prezentas efektivigon de nia idealo! Ĝi estas nur provo, sufiĉe rapide redaktita por doni kiel eble plej baldaŭ sciigojn pri la definitiva fondo de nia Asocio kaj ĝia organo. — Por la komenco ni ankaŭ ne fiksas la precizajn datojn de elirado de la revuo, sed tamen ni povas promesi, ke ni penos ĉiam elirigi ĝin plej rapide.

Nia „telefono”.

Grava laboro propaganda. Certe preskaŭ ĉiu el ni provis jam propagandi Esperanton inter siaj samnaciaj gekolegoj-instruistoj. Sed la rezultatoj? Ili egalas preskaŭ al nulo, se ni komparas tiun **grandegan** nombron de niaj samprofesianoj en la tuta mondo kun la nombro de geinstruistoj esperantigitaj. — Jam en nia unua kunveno en Cambridge mi rakontis, kiamaniere mi provis interesigi miajn gekolegojn en Moravio kaj Bohemujo pri Esperanto kaj kiel mi sukcesis gajni multajn el ili por nia afero (mi ankoraŭ revenos al tiu ĉi afero en unu el la venontaj kajeroj de nia revuo). Kaj mi aldous tiam, ke kolegoj tiamaniere gajnitaj por Esperanto, ne fariĝas esperantistoj por kolekti uzitajn poŝtmarkojn aŭ diversajn fantaziajn vidaj-kartojn — sed por ricevi la plej grandan profiton moralan, por riĉigi sian scion precipe pri aferoj profesiaj k. t. p. — Nuna mondo, kaj certe ankaŭ la mondo estinta kaj estonta, deziras havi profiton el ĉio. Profiton aŭ materialan aŭ moralan. Se ni propagandas Esperanton nur per vortoj kaj eĉ promesas aŭ priskribas la profitojn, kiujn alportas helpa lingvo internacia al siaj adeptoj, tamen grandega plimulto estas skeptika, ne kredas

Al nia celo.

Ni ne dubas, ke multaj el niaj legantoj scias, ke jam en la XVII-a jarcento nia prainstruisto Joh. Amos Comenius proponis aranĝi en Hamburg la kunvenon de diversnaciaj scienculoj kaj instruistoj kaj fondi la internacian asocion de instruistuloj, kiuj povus interkomunikiĝi ĉu persone ĉu skribe per la komuna lingvo internacia, kiun oni por tiu celo nur devus krei, ĉar laŭ la opinio de Comenius la lingvo latina jam en tiu tempo ne sufiĉis por la bezonoj de la sciencoj kaj por la plibonigado de la mondo . . .

Kompreneble, tiam ĉi tiu plano ankoraŭ ne estis kaj ne povis esti efektivigita.

Sed la ideo de Comenius ne malaperis. Renovigis ĝin en Bohemujo la ĉeĥa pedagogo M. J. Mašek en la jaro 1872. Li komencis eldonadi por la instruistaro slava la multelingvan revuon „Slavjanskij Pedagog“ (Slava Pedagoĝo). La revuo enhavis artikolojn, kiuj estis verkitaj en diversaj slavaj lingvoj. Sed la vivo de tiu revuo ne estis tro longa; ĝi eliradis nur dum du jaroj (1872–1873). La revuo mortis, ĉar la nescio de lingvoj estis la danĝera rifo, sur kiu ĝi devis rompiĝi.

Kaj ne malpli interesa estas la propono, kiu aperis en la jaro 1884 en Germanujo – krei por Eŭropo la konstantan internacian konsilantaron pedagogian, kies tasko estus zorgi pri la aferoj, kiuj koncernas la plibonigon de l' edukado en lernejoj elementaraj. Bedaŭrinde ankaŭ tiu ĉi kaj ankoraŭ kelkaj aliaj bonaj planoj ne povis efektiviĝi precipe pro la neekzisto de komuna interkompreniĝilo.

Sed la ideoj de niaj antaŭuloj ne malaperis ankaŭ en nia tempo, kiu dank' al Esperanto, la genia verko de Dro Zamenhof, posedas tre taŭgan ilon, kiu ebligas al ni efektivigi tion, kio estis neebla por niaj antaŭuloj.

Ni aŭdis jam dum la tria esperantista kongreso en Cambridge (en la kunveno de instruistoj), ke la preparaj laboroj por la eldonado de „Internacia Pedagogia Revuo“ estas faritaj, sed post longaj konsideroj oni tamen venis al la decido, ke la singardemo postulas ankoraŭ iom atendi kun la realigo de la plano,

ĉar la entrepreno povus malsukcesi, se ankoraŭ ekzistis neniu Asocio, kiu povus esti la forta apogilo por tiu ĉi grava entrepreno, kies malsukceso malutilus ne sole al nia komuna afero — Esperanto kaj esperantismo — sed ankaŭ al la estonta organizado de profesiaj instruistoj, kiuj volus organiziĝi per helpo de Esperanto.

Hodiaŭ, kiam estas fondita definitive la „Internacia Asocio de Instruistoj“, estas ankaŭ pli facile komenci la eldonadon de la revuo.

*

Nun ankoraŭ kelke da vortoj pri la programo de la „Internacia Pedagogia Revuo“ (I. P. R.). Ĝia enhavo konsistas precipe el tiuj ĉi fakoj: I. Artikoloj pedagogiaj aŭ tuŝantaj la demandojn, kiuj rilatas la aferojn pedagogiajn. II. Lernejoj kaj geinstruistaro. III. Internacia Asocio de Instruistoj. IV. Internacia Oficejo por Instruantoj de Esperanto (raportoj, diversaj informoj ktp.). V. Literaturo: *a*) pedagogia, *b*) scienca, *c*) por gejunularo. VI. Revuo de Revuoj (dediĉita precipe al gazetara literaturo pedagogia). VII. Notoj kaj informoj. VIII. Diskutejo (sole por la aferoj, kiuj rilatas iel la demandojn profesiajn aŭ pedagogiajn k. s.). IX. Korespondado de geinstruistoj. X. Adresaro de gejunuloj, kiuj deziras korespondadi. La revuo alportados ne nur artikolojn originalajn, verkitajn speciale por ĝi, sed ankaŭ tradukojn kaj ekstraktojn de gravaj kaj internacie interesaj artikoloj kaj sciigoj, kiuj estis publikigitaj en la plej bonaj pedagogiaj revuoj diverslingvaj. — En la fako literatura ni raportos pri la plej gravaj verkoj diverslingvaj, kiuj povas iel utili al profesiaj laboroj de instruistoj. — Por ke ni konu nin reciproke kaj povu helpi unu la alian, precipe en aferoj specialaj, preskaŭ ĉiu kajero de la revuo enhavos en la fako „Korespondado“ sciigojn de diverslandaj kolegoj, kiuj serĉas aŭ proponas ĉu korespondadon ĉu helpon en la aferoj, kiuj postulas reciprokan helpon de specialistoj. Tiu ĉi rubriko estos tre grava precipe por kolegoj verkistoj k. a.

Kompreneble, tio ĉi ne estas la plena nomaro de ĉiuj fakoj, por kiuj estos loko en la revuo. Ilia nombro kaj riĉeco dependos de la nombro de kunlaborantoj, de amplekso de la revuo kaj tiu fine de la nombro de la membroj de I. A. I. kaj apartaj abonantoj.

Certe ni ĝojus ĉiuj, se nia organo post kelka tempo povus enhavi krom la nomitaj fakoj ankoraŭ ĉi tiujn: Pedopsikologio, Pedopatologio, Filozofio kaj didaktiko lerneja, Eduko internacia kaj pacifisma, Eduko artista, Higieno lerneja ktp., ktp.

En la fino ni ne povas ne tuŝi tion, kiom da utilo alportos nia revuo kun la programo ĵus montrita – se ĝi estos ĉiuflanke helpata de la kolegoj diverslandaj – al niaj profesiaj gazetoj naciaj. Ĉu ni ne povos riĉigadi ilian enhavon per tradukoj el nia komuna revuo internacia, kiu estos konstante plenigata per interesaj kaj gravaj sciigoj, kolektataj de ĉiunacia instruistaro tutmonda?

Karaj gekolegoj, ĉu vi volas helpi ĉiuj laŭ siaj fortoj la efektivigon de tiu plano, kiun ni ĵus antaŭ vi disvolvis? Ĝi certe efektivigos, se vi deziros, **energie** deziros kaj **laboros** por ĝia efektivigo!

La redakcio.

Ideo de J. A. Comenius pri la lingvo universala.

Originale verkita de *Josef Krumpholtz*, Bystřice-Hostýn (Moravio).

»Min tiel formis la naturo (pro kio mi dankas al patro de naturo), ke eĉ la plej bagatelaj esploretoj pri kiu ajn vero estas por mi kiel multekostaj ŝtonoj.«

Methodus linguarum novissima.

La nomo Johannes Amos Comenius (Komenský) sonas nun jam sufiĉe ofte ankaŭ en la monda literaturo pedagogia, sed ĝis nun preskaŭ ĉiam nur kiel la nomo de glora reformatoro pedagogia aŭ eble ankaŭ kiel la nomo de la lasta episkopo de „bohem-moraviaj fratoj“, sekve kiel la nomo de pedagogo aŭ teologo, malpli ofte kiel la nomo de filozofo-„panzofo“, kiu volis ĉion ordigi por ĉiuj, sed neniuj ĝis nun, ekster Bohemoj, skribis pri Comenius kiel pri propagandinto de artefarota lingvo universala. Ja eĉ tiel granda verko, kiel estas la „Histoire de la Langue Universelle“,¹ eĉ per unu vorteto ne aludas la nomon de J. A. Comenius, kvankam tiu ĉi glora Moraviano, „instruisto de la mondo“, pli ol 30 jarojn okupis sin per la ideo pri artefarota lingvo universala kaj skribis pri ĝi en siaj plej grandaj kaj plej gravaj verkoj post la jaro 1640 ĝis sia morto en la jaro 1670.

Pro tio, kaj ankaŭ, ĉar mi kredas, ke kiel ne havas klaran ideon pri Comenius-pedagogo, kiu lin ne konas kiel filozofon-„panzofon“, al kiu la plibonigo de edukado estis nur parto de plibonigo de la tuta vivo homara, ke tiel ankaŭ ne

¹ *Histoire de la Langue Universelle* par L. Couturat, Docteur ès lettres et L. Leau, Docteur ès sciences, Paris, Librairie Hachette et Cie, 1903. Paĝ. XXX + 576.

havas klaran ideon pri Comenius kiel panzofio tiu, kiu ne konas lian sopiron kaj penadon pri la artefarota lingvo universala, per kiu precipe la „panzofio“ (ĉioscio, universala saĝeco) estis prilaborota kaj inter ĉiuj nacioj de mondo disvastigota, kaj tiel la plibonigo de aferoj homaraj efektivigota aŭ almenaŭ plifaciligota kaj ebligota — pro tio ambaŭ mi kuraĝas fari la provon pri klarigo de la ideo de Comenius pri la artefarota lingvo universala, esperante, ke per tio mi ne nur utilos al nia afero, al Esperantismo, sed eble ankaŭ iniciatos al pli larĝa kaj pli bona studo kaj kono de Comenius.

* * *

Tiu erarus, kiu pensus, ke la plibonigo de lernejoj kaj edukado estis por Comenius la sola kaj la lasta celo. Tio estis nur preparo kaj ŝtupo al io pli alta. En la komenco de ekzilo de nekatolikoj el ĉeĥaj (bohemiaj) landoj estis tiu celo la „restitucio“ de lia patrujo kaj eklezio bohem-moravia¹ kaj poste, kiam tiu ĉi espero malaperis, alkondukas lin la eksterordinara sukceso de lia glora verko „*Janua linguarum*“ (Pordego de lingvoj) el la jaroj 1631 al la ideo de pordego de objektoj aŭ „panzofio“, kiel celo de instruado.

Sed ankaŭ tio ne sufiĉas al Comenius, kaj li starigas sian panzofion en servojn de plibonigo de la maljuniĝanta mondo kaj de la aferoj homaraj² — de laboro, kiu havis grandegan signifon filozofian kaj politikan kaj en kies sistemo trovis sian gravan lokon, kiel substanco ĝia, apud „Pansophia“ kaj „Pampaedia“ ankaŭ „Panglottia“, t. e. provo kaj instrukcio, kiel ordigi kaj prilaboradi ĉiujn lingvojn ĝis nun tiel konfuzitajn, serĉado de metodo, kiel plifaciligi studadon de lingvoj, ke kiu ajn povu baldaŭ kaj facile ellerni kiun ajn aŭ kiom ajn da lingvoj aŭ ankaŭ, kiel oni povus krei unu ian lingvon al la tuta mondo komunan³ kaj tiel lumon de spirito kaj kulturon (civilizacion) per lingvo disvastigadi inter ĉiujn naciojn, generaciojn kaj lingvojn sur la tuta tero, ke nacioj ne estu tiel kruelegaj (sovaĝaj) kaj ĉesu sin mem ne koni, timi, malami kaj pri si ne zorgi, ke estu forigita obstaklo (malhelpo) de lingvoj kaj homaj interrilatoj, kaj ke „panor-

¹ »*Opera didactica omnia*« I, 197.

² t. e. de kulturo (civilizacio), burĝa administrado kaj religio (Antaŭparolo »*De rerum humanarum emendatione*«), aŭ saĝeco de spirito, pieco de koro kaj pacemo de vivo, t. e. filozofio, religio kaj politiko (*Panegesia* IV, 26.).

³ *Panaŭgia* XIV, 6.

hosio“, t. e. universala plibonigo efektiva estu fine efektive ebla.¹

Se Comenius diras, ke nur tiam, ĝis kiam la „panglotio“ forigos malhelpojn de interrilatoj homaraj, estos ebla² la universala plibonigo de aferoj homaraj, per tio li atestas, ke li vidis en plifaciligado de studo de lingvoj, aŭ pli vere en kreo de unu ia lingvo al la tuta mondo komuna, universala³ ion absolute bezonan, ion necesan⁴.

Do estas kompreneble, ke Comenius dediĉis al tiu ĉi sia ideo pri universala lingvo artefarota, kiu lingvo devus esti — apud la gepatra — universala en la renovigota edeno kaj loĝejo de la homara bonfarto jam sub la ĉielo, tie ĉi sur la tero, ne sole kelkajn vortojn kaj paragrafojn, sed ankaŭ tutajn ĉapitrojn de siaj plej noblaj verkoj en la lastaj, sekve la plej karaj 30 jaroj de sia laborplena vivo.

(Daŭrigo.)

La instruado en Nederlando (Hollando).

Originale verkita de *Dreves Uitterdijk*, Hilversum (Nederlando).

Laŭ la leĝo en Hollando la ŝtato prizorgas, ke ĉie en la lando estu garantiata sufiĉa popolinstruado. Tial la leĝo devigas ĉieloke la provincerojn fondi sufiĉan aron da lernejoj kun instruistoj, kies salajroj estas leĝe fiksitaj.

Nur se la privata iniciativo sufiĉe plenumas tiun ĉi postulon kaj tial la ŝtataj, *neŭtralaj lernejoj*, restadas malplenaj pro perdo de lernantoj, tiam la ŝtatlernejo estas fermata kaj la instruistoj ricevas partan salajron ĝis kiam ili povas esti translokitaj. Tio okazas ofte en regionoj, kie la religiaj partioj superregas la loĝantaron, kies kredo estas precize kontraŭa je tia neŭtraleco de l' instruado. La instruada leĝo ja diras: „Al instruisto estas malpermesite ion fari, diri aŭ permesi, kio estus kontraŭa je la respekto, kiun oni ŝuldas al la religia kredo de alipensuloj . . .“ Tial instruisto ne povas kaj volas miksi la religion en sian instruadon pro timo enigi ian dogmon, ofendigan je ia partiulo. Sed por la vera kredulo estas precize la religio, kiu estas la ĉefa parto, kaj tial ili fondis specialajn lernejojn (ortodoksajn aŭ katolikajn). Sed ili devis ĉion pagi el propra monujo, ne nur la lernejojn, sed ankaŭ la salajrojn,

¹ *Panaŭgia* XIV, 32. Komparu ankaŭ antaŭparolon § 10 kaj resumon de la verko »*De rerum humanarum emendatione*« kaj en *Panaŭgia* XIV, 6, 9, 12, 14, 15, 19, 21, 22, 25, 29—31, 32.

² *Panaŭgia* XIV, 32.

³ *Panaŭgia* XIV, 6

⁴ Vidu *Unum necessarium* III, 8.

dum per la impostoj ili ankaŭ devis kunporti la kostojn de l' ĝenerala instruado. Tial dum la supereco de eklezia ministraro (Kuyper) oni aliigis tion tiamaniere, ke nun ĉiu lernejo povas ricevi helpan monon el la ŝtata kaso kaj ke ĉiu instruisto kiu ajn povas partopreni en la pensiokaso de l' ŝtato.

Por ĉiu infano *la instruado estas leĝe deviga*, je puno de mono aŭ malliberejo. La komunumoj pagas la kostojn (kun procenta helpo de l' ŝtato) de la publika instruado.

La instruado estas sub *kontrolo de specialaj inspektoroj*, kiuj ĉiam povas veni konstati, ĉu ĝi estas tute konforma je la programo k. c. kaj ĉu la lernejo mem estas laŭ la ordonoj de l' saniga komisio. Se ne, la lernejo tuj devas sin konformi aŭ estas anstataŭita de alia konstruaĵo.

Jam dum plena jarcento severa dugrada *ekzameno estas devigata* por ĉiu persono, kiu volas instrui en kia ajn lernejo. La fakoj ekzamenataj estas nomitaj en la leĝo (ankaŭ gimnastiko, desegno, franca, germana kaj angla lingvoj.) La instruado en fakoj ne en la leĝo nomitaj estas tute libera kaj sen kontrola ekzameno.

La minimumoj de l' instruistaj salajroj estas leĝe regulitaj kaj fiksitaj laŭ la *nombro de servjaroj* kaj la diversaj *diplomoj, postulataj* en la funkcio, kiun ĉiu instruisto plenumas persone. Por la *malalta instruado* oni havas du gradojn, ĉiu kun aparta diplomo, nome:

1. *helpa instruisto* (diplomo atingebla por almenaŭ 18-jaraj personoj).
2. *ĉefinstruisto* (nur permeso fari ekzamenon por tio post 2-jara praktiko en la instruado).

NB. La dua (plena) ekzameno estas permesita nur al tiuj, kiuj enŝendis la unuagradan diplomon.

La *mezgrada instruado* postulas diplomon por ĉiu fako aparte. Por atingi mezgradan diplomon en ia fako, nenia antaŭa diplomo estas postulata, kaj estas nature nur fakinstruado por lernantoj, kiuj trairis ĉiujn klasojn de l' komuna malalta lernejo kaj eniras mezgradan lernejon post sukcesa ekzameno. Ni havas du specojn de tiaj lernejoj, t. e. *kun 3-jara kurso* (en malgrandaj urboj kaj gravaj vilaĝoj) kaj *kun 5-jara kurso* (en grandaj lokoj, kelkaj urboj havas 2 aŭ 3 de tiaj lernejoj). Ambaŭ havas apartan finan diplomon post ekzameno antaŭ la komisio, kiu ne enhavas kiel membro la instruistojn de l' ekzamenata junulo. Nature la 2-a diplomo estas pli grava kaj valora.

Ekzistas ankaŭ la stranga kondiĉo, ke ĉiu oficiro havas la rajton instrui en ĉiu mezgrada lernejo ĉiun fakon sen havi specialan

diplomon. Ili eĉ estis privilegiitaj funkciuloj ĝis nun, kvankam estante tute nespecialistoj kaj eĉ forgesintaj la plej multon de tia fako.

Por instrui lingvojn en lernejo 3-jarkursa oni bezonas diplomon *A* kaj en 5-jarkursa lernejo diplomon *B* (la sama, sed kun la scio de la tuta literaturo de l' fremda lingvo: franca, germana aŭ angla).

La *grado de doktoro* postulas universitatan studadon kun feliĉe defendita pruvskribaĵo. Multaj klopodas atingi tiun gradon kaj titolon en eksterlanda (fremda) universitato, kiu estas multe pli facila, sed ne tiom ŝatata.

La sama rimarko por la *alta instruado* de l' universitato, nur farata de profesoroj.

Kosto de la lernado: La instruado de l' proletaria klaso kostas nenion (en urboj oni havas apartajn bonegajn lernejojn, speciale por ili, en vilaĝoj ili sidas intermiksitaj kun pagantuloj).

Laŭ la societa stato kaj posedo de l' gepatroj oni havas en grandaj urboj lernejojn de la 1^a, 2^a kaj 3^a klaso. Infanoj, por kiu oni pagas la plej multe, havas pli malgrandajn arojn de kunlernantoj.

La pli altaj branĉoj de lernado estas nur por pagantuloj (almenaŭ se la komunumo ne pagas por proletariuloj).

La institutoj povas uzi instruistojn kun malalta aŭ kun mezgrada diplomo.

Nur en proletariulaj lernejoj oni tute ne instruas ian fremdan lingvon; en la ĉefaj, pagantulaj lernejoj oni almenaŭ instruas la francan lingvon; ofte ankaŭ la germanan aŭ anglan lingvojn aŭ ambaŭ.

Dum la lastaj jaroj la granda prefero de l' franca lingvo malpligrandiĝas por la progresado de la lingvo angla.

Kongreso de la slava instruistaro en Praha la 9.—14. de aŭgusto 1908.

En tiu kongreso partoprenis reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj organizoj de la slava instruistaro en Aŭstrio. Partoprenis ĉirkaŭ 6000 personoj. Ĝi estis kongreso manifesta kaj labora. La partoprenantoj dispartiĝis en 3 sekciojn. La I-a sekcio laboris super la problemo: *Nacieco kaj ĝia signifo en la eduko*, la II-a sekcio: *Nacia eduko en la lernejo*, la III-a: *Nacia eduko eksterlerneja*. Apartan citon meritas precipe la sekcio unua, kiu traktis pri la biologiaj, psikologiaj kaj sociologiaj motivoj de la nacia eduko krom la problemo de reciprokeco, parenceco kaj diferenco de laboro kaj pri la

batalo nacieca. La referatoj de scienca karaktero staris sur nivelo de moderna tempo. La I-a sekcio sukcesis prezenti novan modernan komprenaĵon de naciismo, komprenaĵon motivitan per la instruo pri sociala solidareco, per la scienca kaj filozofia stato nuntempa, la ceteraj sekcioj aplikis la principon en praktiko lerneja. Ni venas al konvinko, ke la ĉeĥa instruistaro en siaj reprezentantoj laboras tre serioze kaj ne restas malantaŭ la instruistaro de la ceteraj nacioj, eĉ de la plej progresintaj. Por ke la fremdlanda instruistaro ekkonu laboron kaj opiniojn de la instruistaro ĉeĥa, proponis H. Alferi, kunlaboranto de nia Revuo, ke la kongresa rezolucio estu tradukita ankaŭ en Esperanton kaj dissendita al la Internacia komitato de la instruistaj federacioj, al la ĉefaj naciaj societoj pedagogiaj kaj al pedagogiaj muzeoj, al la enlandaj organizoj instruistaj kaj al iliaj asocioj, al la Internacia Oficejo de Paco en Berne, kaj al la ĉeĥaj oficoj lernejaj. La propono estis unuanime ĝoje akceptita.

Per tiu dissendo de la rezolucio ĉeĥoj malfermas regulan internacian interkomunikon inter la instruistaj kaj pedagogiaj institucioj kaj petas la kolegojn de la ceteraj landoj kaj nacioj, ke tiu ĉi komenco fariĝu internacia kutimo.

Krom tio ĉi oni kreis konstantan komision, kiu okupiĝos per studado de la problemo de la nacia eduko kaj per ĝia praktika realigo en la ĉeĥaj lernejoj. *H. Al. Feri* (Bohemujo).

*

Ankoraŭ pri la kongreso de la slava instruistaro en Praha 1908. La estraro de la I-a sekcio de la kongreso ricevis ankaŭ plenigan referaton, kiu traktis ne nur problemon de principo de naciismo, sed ankaŭ problemon de internaciismo en la edukado.

La referanto *H. Alferi* rimarkigas, ke ni komencas vivi pli konscie sub la influo de natura leĝo de *sociala solidareco*, kiu leĝo fariĝas la ĉefa principo de la scienca moralo. Sub premo de tiu leĝo la moderna homo konstruas amikajn ligilojn internaciajn. Libera penso, pacifismo, esperantismo, homaranismo, socialismo kaj framasonismo esprimas tiujn arojn da ideoj, per kies influo estas realiĝonta la „sistemo de la ŝtatoj“, la internacia federacio de la ŝtatoj kaj de la nacioj, kaj la regado de la ideoj internaciaj, ideoj de la rajto kaj justeco, kaj ilia praktikado en la vivo sociala.

Marŝo de tiuj ideoj ne haltas antaŭ la lernejo. Tiu, devante formi estontan pli perfektan socialan staton, devas ankaŭ reguli ĝian venon per la preparo de la gejunularo.

Por ke la lerneja eduko nacia estu konforma al la moderna tempo, ĝi estos inspirata de la sekvantaj principoj:

I. La persona moralo konsentas kun la moralo nacia kaj ĝenerala (laika, scienca).

II. La ĉefa principo de la scienca moralo estas principo de la sociala solidareco. Sur tiu ĉi teorio estu konstruata teorio de la devo sociala.

III. En la reciproka rilato de la individuo al la tuto familia, nacia, tuthomara kaj en la reciproka plenumado de la devoj oni devas vidi devenon de la *libereco kaj rajto de la homo, devenon de la rajtoj de la nacioj kaj de la rajto internacia*. La individua libereco realigata en praktika komunismo estas limigita sole per la libereco kaj egala rajto de la aliaj kaj per la devo de individuo partopreni en la reciproka elŝanĝado de la servoj kaj per ĝia partopreno je imposto al la progreso. Konfeso de valoro de la gepatra lingvo en la vivo privata kaj publika, en lernejoj kaj oficoj, estu konsiderata kiel minimumo de la rajtoj kaj gardi tiujn rajtojn estu proklamita kiel sankta devo de ĉiuj unuoj de la nacio. Estu ĝenerale proklamitaj kaj konfesitaj la sekvantaj rajtoj de la nacioj, kiel formulis ilin ĝeneralaj kongresoj de Paco:

1. La principoj de la rajtoj kaj de moralo de la nacioj estas identaj kun la principoj de moralo kaj de la rajtoj de la individuoj.

2. Kiel al neniu estas permesita juĝi sin mem, tiel neniu nacio havas rajton proklami la militon.

3. Ĉiu konflikto inter nacioj estos solvita per juĝistaro.

4. Ĉiuj nacioj estas intersolidaraj kaj havas rajton defend sin kontraŭ perforto.

5. Ekzistas nenia rajtigiteco milita.

6. La nacioj havas netuŝeblan kaj neĉeseblan rajton libere decidadi pri si mem.

7. La aŭtonomio de ĉiu nacio estas netuŝebla. „Zorgi pri la rajtosento de nacio estas zorgi pri sano kaj forto de la ŝtato en la societo.“ „En batalo cian rajton ci serĉos!“ (R. Ihering). La deziro pligrandigi la regatan regionon al malutilo de la aliaj detruas la sentojn de la rajto kaj justeco kaj ĝia realigo detruas plej profunde la pacan kunvivon de la nacioj.

IV. La paco daŭras normale, kiam efektiviĝas la regado de la devo kaj rajto, de la justeco, libereco, egaleco kaj frateco.

V. La komprenaĵojn de la persona kaj nacia honoro oni ne povas identigi kun la peno solvi la konfliktojn per duelo kaj milito, sed kun la transdono por solvi al la arbitracio (enhavata jam parte en la proklamo de la rajtoj de la nacioj). Tiuj principoj

estu praktikataj en la lernejo kaj poste en la vivo ĉe ĉiu okazo kaj en ĉiu medio.

VI. La publika opinio de la nacia kaj tutmonda publiko estu kreata en konsento kun tiuj ĉi ideoj; morale motivata ĝi akiras forton kaj influon. Nacia indiferenteco al tiu ĉi ĝenerala „voĉo de popolo“ egalas al indiferenteco morala.

VII. La grandecon de la nacio oni mezuras nun per tio, ke ĝi ebligu en ĉiu periodo la plej altan atingeblan disvolviĝon de la fizika, psika kaj morala agado de la naciaj unuoj, ke ĝi la samon atingu ĉe si kiel tuto, sciu sin kaj sian organizon ĝustatempe konformigi al novaj kondiĉoj en harmonia kunigado de la ideo de progreso kun la ideo de ordo, ke ĝi aliĝu solidare sen malutilo sur sia libereco kaj egaleco al la tuto internacia kaj sciu honeste valorigi sin en la internacia konkurado de la nacioj. Per tiuj ĉi mallonge skizitaj ĉefaj principoj estu direktata la nuntempa agado eduka, por ke ĝi fariĝu elvenejo el la ĝeneralaj konfuzoj kaj necerteco, kaj por ke la nuntempa lernejo kaj instruistaro plenumu per tio sian kulturan kaj moralan difinon. El tia kompreno de la nacia eduko elvenas ankaŭ plua konsekvenco por la instruistaro, ke la nomitaj principoj estu valorigataj en ĉiuj planoj edukaj kaj ĉe la instruistaro de la ceteraj nacioj, do ĝenerale. La problemo de la nacia eduko — laŭ mia opinio — aperados tre ofte ne nur sur programoj de ĝeneralaj instruistaj kongresoj naciaj (de la apartaj gentoj), sed ankaŭ tre ofte okupos la pensojn ĝenerale kaj estos solvata en internaciaj kongresoj lernejoj, kie certe plej bone estos ellaborita la harmonio de principo de naciismo kaj internaciismo en la eduko.

Raportas *J. Holub* (Moravio).

La salajroj de instruistoj en Skotlando.

De *Charles F. Macgregor*, M. A., Edinburg (Skotlando).

En Skotlando la salajroj de ĝeinstruistoj multe diferencas laŭ la diversaj kategorioj de lernejoj. En lernejoj vilaĝaj aŭ urbataj la salajroj estas ordinare malpli grandaj ol en lernejoj urbaj. Post kiam la juna instruisto eliris el la „normala lernejo“, li povas esti eĉ direktoro en ia lernejo, laŭ kapabloj, sed ordinare li devas komenci kiel subinstruisto. En lernejo vilaĝa oni komence ricevas ĉirkaŭ L 90 (L 1 angla = 20 ŝilingoj = 25 frankoj = 10 spesmiloj). Tiu ĉi salajro pligrandiĝas ĝis ĉirkaŭ 1200 Sm. La salajroj de la direktoroj ne estas aranĝitaj laŭ ia regulo. Unuj ricevas 1200 Sm., la aliaj 2000 Sm. aŭ 3000 Sm., laŭ la grandeco de la lernejo kaj la grandeco kaj riĉeco de la loĝantaro. En urboj grandaj oni ricevas pli grandajn salajrojn, sed ili ne estas egalaj en ĉiu urbo.

Ekzemple en mia urbo oni ricevas salajrojn pli grandajn ol en la plimulto de aliaj urboj skotlandaj. La sekvantaj tabeloj montras la salajrojn de la geinstruistoj en Edinburg.

1. Vilaĝaj kaj urbataj lernejoj:

klaso	viroj	virinoj
subinstruistoj:	900 – 1200 Sm.	600 – 900 Sm.
direktoroj (lernejestroj):	1300 – 3000 Sm.	—

2. Urbaj unuagradaj lernejoj (Edinburg):

klaso	viroj	virinoj
subinstruistoj:	950 – 1600 Sm.	600 – 1000 Sm.
ĉefinstruisto*:	1700 – 2500 Sm.	1000 – 1300 Sm.
direktoroj:	2500 – 4000 Sm.	—

3. Urbaj duagradaj lernejoj (Edinburg):

klaso	viroj	virinoj
subinstruistoj:	1300 – 2000 Sm.	1000 – 1200 Sm.
ĉefsubinstruistoj:	2000 – 2500 Sm.	—
direktoroj:	4000 – 6000 Sm.	—

Rimarko: En Edinburg la salajroj pligrandiĝas ĉiujare po 50 Sm.

Konkludante, mi devas denove klarigi al miaj kolegoj alilandaj, ke la ŝtato ne fiksas la salajrojn. Preskaŭ en ĉiu vilaĝo, urbeto aŭ urbo la salajroj estas diferencaj.

El manuskripta »Instruista Rondiranto.«

Internacia Asocio de Instruistoj (I. A. I.).

La ideo pri la I-a internacia kongreso de instruistoj-esperantistoj aperis publike jam en la jaro 1906, kiam, antaŭ la II-a kongreso esper. en Genève, la ĝeneva ĵurnalo „Esperanto“ (19. aŭgusto 1906, Nro 23.) alportis la jenan alvokon: „*Al Instruistoj Kongresanoj*. Estus tre utile, se povus kunveni kaj reciproke konatiĝi kolegoj instruistoj, kiuj ĉeestos en la dua kongreso. Multego da grava kaj preparolinda materialo certe ne mankas. Tiel efektiviĝus la I-a internacia kongreso de instruistoj-esperantistoj. Kolegoj, kiuj intencas partopreni en tiu kunveno, volu tuj sendi sian adreson kaj proponojn al Theodor Ĉejka, instruisto en Bystřice-Hostýn, Moravio, Aŭstrio.“ — Post tiu alvoko venis — 3 adresoj (frl. Durieux, s-ino Durieux kaj s-o Durieux, ĉiuj el Lille en Francujo), se mi ne kalkulas la nomojn de miaj kolegoj s-oj J. Krumpholt kaj J. Holub (ambaŭ el Moravio), kiuj venis kun mi al la kongreso en Genève — kaj neniu propono. Laŭ tio mi jam sciis, ke la tempo ankoraŭ ne venis . . . Kompreneble, la „kongreso“ de instruistoj-esperantistoj ne efektiviĝis ankoraŭ . . .

Venis la III-a kongreso esper. en Cambridge 1907. La „kunsido internacia de instruistoj“ estis metita en la oficialan programon de specialistaj kunsidoj dum la kongreso. La kunsido

* Nur unu en ĉiu lernejo!

okazis la 14-an de aŭgusto 1907 en la urbdoma salonego (Guild-hall). Ĉeestis pli ol 50 personoj, kiuj reprezentis geinstruistaron anglan, belgan, boheman, francan, germanan, nederlandan, rusan kaj skotlandan. Sinjoro Durieux, direktoro de la lernejo el Lille proponis, ke sinjoro Maréchal, profesoro el Leeds (Anglujo), malfermu la kunsidon. Li akceptis afable tiun taskon, supreniris la estradon kaj malfermante la kunsidon, li petis, ke oni elektu la estraron de la kunsido. Elektitaj: prezidanto — prof. Maréchal, vicprezidantino — frl. Guillaume, instruistino el Bruxelles (Belgujo), sekretario — s-o Grňa, faka instruisto el Jevičko (Moravio).

Pri la agado de la kunsido mem raportas la oficiala protokolo* jene:

„I. Unuvoĉe akceptita la propono de inspektoro de gimnazio R. Frenkel krei la „Internacian Asocion de Instruistoj“, kies celo estas: 1. Ĉiujare eldonadi adresaron de instruistoj kaj lernantoj, kiuj scias Esperanton. 2. Eldonadi librojn en Esperanto por infanoj. 3. Plifaciligadi la vojaĝojn de lernantoj kun iliaj instruistoj. 4. Organizi la korespondadon inter instruistoj kaj lernantoj. — II. En la provizoran komitaton, kiu devas elabori la regularon por la Asocio, estis elektitaj, laŭ la propono de prof. Otto Simon el Ung. Hradisch: R. Frenkel, Enisejsk (Rusujo); Th. Ĉejka, Bystrice-Hostýn (Moravio); F. Maréchal, Leeds (Anglujo); F. Durieux, Lille (Francujo). — III. La regularo estos publikigita en la revuo „Le Nord Pédagogique“. Tiu numero estos sendita de s-o F. Durieux al ĉiuj instruistoj, kies adreso estos konata de li. — IV. Akceptita la propono de s-o Th. Ĉejka krei kelke da rondetoj de diversnaciaj instruistoj, kies celo estus propagandi sukcese Esperanton inter instruistoj (per helpo de manuskriptaj „Rondirantoj“, kies celo kaj aranĝo estos klarigita en unu el la venontaj Nroj de la I. P. R. — rim. de la red.). — V. Akceptita la propono de s-o Th. Ĉejka eldonadi la gazeton „Internacia Pedagogia Revuo“, kiu, laŭ la propono de direktoro F. Durieux, havos la subtitolon: Organo de la „Internacia Asocio de Instruistoj“. — Oni aplaudis la sciigon de s-o Ĉejka, ke la parto de preparaj laboroj estas jam finita. (Por kio la merito apartenas al s-o H. Alferi, lernejestro en Zdislavice-Humpolec, Bohemujo — rim. de la red.). — VI. S-o F. Durieux raportas pri la enkonduko de Esperanto en lian lernejon en la urbo Lille (departemento du Nord), kion aprobis la inspektoro de tiu departemento. Tiu inspektoro metis en la oficialon cirkuleron, kiu ĉiujare estas dissendata al ĉiuj direktoroj kaj instruistoj, ankaŭ la jenajn demandojn: 1. Ĉu la instruisto au direktoro scias Esperanton? 2. Ĉu li intencas instrui ĝin? — S-o Durieux konsilas al ĉiuj ĉeestantaj instruistoj sekvi lian ekzemplon kaj laŭ ebleco instrui Esperanton en lernejoj. — VII. S-o Maréchal proponas, ke oni, instruante Esperanton, uzu la naturan metodon de Gouin (sen uzo de gramatiko). Tiel la lernado de Esperanto fariĝos pli agrabla kaj interesa ne nur por la instruato, sed ankaŭ por la instruanto.“ —

* Laŭ la »Esperantista Dokumentaro«, kajero sesa, p. 128.

La projektojn de la regularo ellaboris s-oj Maréchal kaj Frenkel, el kiuj la projekto de s-o Frenkel estis publikigita en la franca gazeto „Le Nord Pédagogique“, kiun s-o Durieux dissendis al 60 geinstruistoj, kiuj sciigis al li siajn adresojn. Poste mi ellaboris, kun mia kolego Krumpholtz, la trian projekton, akceptinte la ĉefajn punktojn de ambaŭ projektoj jam prezentitaj kaj tiu nova projekto servis kiel fundamento por la diskutado pri la regularo definitiva, kiu estis poste akceptita en Dresden.

Dum la IV-a kongreso esperantista en Dresden (1908) oni jam pli bone zorgis pri la aranĝo de niaj kunsidoj, pri kio la ĉefa merito apartenas al s-o K. Schönherr, instruisto en Dresden. Li publikigis jam antaŭ la kongreso „Alvokojn al instruistoj“ en gazetoj esper. kaj zorgis ankaŭ pri la programo por la kunsidoj. La programo, fiksita antaŭ la kongreso, enhavis la sekvantajn punktojn: 1. Malfermo de la kunsido. 2. Elekto de la estraro. 3. F. Durieux: Esperanto kaj lernejoj en Francujo, precipe en Lille. 4. Legado de la regularo. Interparolado kaj decidoj pri ĝi. 5. Th. Ĉejka: „Internacia Pedagogia Revuo“ kaj ĝia signifo por la tutmonda instruistaro. 6. Th. Ĉejka: Rezultatoj de unujara ekzisto de la „Instruista Rondiranto“ kaj ĝia tasko estonta. 7. F. Maréchal: Pri metodoj, laŭ kiuj lernigi Esperanton. 8. K. Schönherr: Leciono kun kelkaj geknaboj. — (La programo, bedaŭrinde, ne povis esti plene elĉerpita pro multaj kaj longaj diskutadoj, kiujn oni erare enportis en la kunsidojn de instruistoj profesiaj).

En Dresden okazis 4 kunsidoj de instruistoj, dum kiuj ĉeestis ĝis 200 personoj, inter kiuj estis reprezentantoj de geinstruistoj el Anglujo, Aŭstrio, Belgujo, Bohemujo, Francujo, Germanujo, Hungario, Moravio, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Rumanujo, Rusujo, Serbujo, Siberio, Skotlando, Svedujo kaj Tunisio. — Ĉiuj kunsidoj okazis en la Teknika Lernejo (Technische Hochschule).

En la unua kunsido (lundo, la 17. VIII. 1908) prezidis prof. Maréchal; apud li s-oj Frenkel, Durieux, Ĉejka, anoj de la provizora komitato. — Prof. Maréchal rememorigas, kion oni faris en Cambridge kaj ankaŭ kion faris la provizora komitato. Poste li tralegis la rezultan projekton de la regularo, ellaboritan de Th. Ĉejka. Relegante tiun projekton, artikolon post artikolo, oni diskutis ĉiun artikolon aparte kaj interkonsento pri la definitiva regularo estis atingita tre facile. La definitiva kaj de la kunsido akceptita regularo de la I. A. I. estas jena:

Regularo

de la Internacia Asocio de Instruistoj (I. A. I.).

I. La „Internacia Asocio de Instruistoj“ celas: 1. Propagandi Esperanton inter geinstruistoj. 2. Propagandi Esperanton inter gelernantoj. 3. Helpi la alproksimiĝon de instruistoj kaj lernantoj de diversaj landoj kaj nacioj. 4. Per internaciaj rilatoj helpi la disvolviĝon kaj solvon de pedagogiaj kaj profesiaj demandoj. 5. Eldonadi aŭ helpi eldonadon de gravaj verkoj pedagogiaj kaj libretoj por gejunularo ktp.

II. La ĉefaj rimedoj de la I. A. I. estas: 1. Oficiala organo. 2. Gazeto por gejunuloj. 3. Periodaj propagandaj alvokoj al diversnaciaj instruistoj-neesperantistoj. 4. Organizado de korespondado kiel inter instruistoj tiel inter lernantoj. 5. Organizado de vojaĝoj de instruistoj kaj lernantoj al fremdaj landoj. 6. Aranĝado de internaciaj kolonioj en diversaj landoj, kie la instruistoj kaj lernantoj povus pasigi la libertempon. 7. Publikigado de l'adreso de instruistoj kaj lernantoj, dezirantaj korespondadi. 8. Eldonado de gravaj libroj pedagogiaj kaj libroj por gejunularo.

III. Ĉiu persono, societo aŭ gazeto, deziranta kunlabori por la celoj de la I. A. I. aŭ iel ĝin helpi, povas fariĝi ĝia membro. La peton por la akcepto oni devas sendi al la estraro de la I. A. I. — Post la enpresado de la nomo de kandidato en la oficiala organo, la kandidato estas akceptita. Membro de la I. A. I. povas esti eksigita nur per la ĉiuvoĉa decido de la komitato; en la okazo kontraŭa — nur per la kunveno ĝenerala.

IV. Ĉiu asocio pagas ĉiujare kotizon 1 Spesmilon, se la ĝenerala kunveno ne decidis alie. La kotizaĵo rajtigas ĉiun membron ricevadi senpage oficialan organon kaj rabate la aliajn eldonaĵojn de la I. A. I. ktp.

V. Krom la ordinaraj membroj de la I. A. I. estas: 1. Propaganduloj, kiuj pagas ĉiujare almenaŭ 4 Sm.; 2. donaculoj, kiuj pagas ĉiujare almenaŭ 10 Sm. — La titolon „membro honora“ povas doni la ĝenerala kunveno laŭ la propono de la komitato. Tiuj ĉi membroj ne pagas kotizaĵon kaj rajtas ricevadi senpage la oficialan organon de la Asocio.

VI. La I. A. I. akceptas dankeme ĉiujn donacojn, kiuj helpas ĝian agadon.

VII. La budĝeta periodo daŭras de unu universala kongreso esperantista ĝis la sekvanta.

VIII. Ĉiu membro nepaginta sian kotizaĵon, eĉ ne post admono, dum unu jaro, estas konsiderata kiel eksiginta.

IX. La I. A. I. estas administrata de la komitato, kiu devas esti kiel eble plej internacia. Ĝi estas balotata por 3 jaroj en la ĝenerala kunveno. La komitato renoviĝas po unu triono de la membroj ĉiujare. La membroj elirantaj estas reelekteblaj. La ĝenerala kunveno elektas krom la komitatanoj la saman nombron da anstataŭontoj.

X. La komitato balotas sian estraron, kiu konsistas el prezidanto, 2–3 vicprezidantoj, ĝenerala sekretario, 2 sekretarioj, kasiso. — Estraro de la komitato estas ankaŭ estraro de la I. A. I.

XI. La kunveno ĝenerala okazas ĉiujare dum la universala kongreso esperantista kaj en la sama kongresejo.

XII. La kunveno ĝenerala ricevas raportojn kaj ĉiujn komunikaĵojn de la komitato, aprobas la kontojn kaj diskutas pri la demandoj rilataj al la funkciado de la I. A. I. — La kunveno ĝenerala balotas per sekreta voĉdono la komitatanojn laŭ la pli-

multo de esprimitaj voĉoj. La voĉdono per la letero estas permezata. — La kunveno ĝenerala povas ankaŭ konsiliĝi pri la ŝanĝoj en tiu ĉi regularo, sed nur laŭ la propono farita de la centra komitato aŭ de almenaŭ 50 asocioj. — La ŝanĝo de la regularo estas akceptata, nur se ĝi estis aprobita almenaŭ de tri kvaronoj de la voĉdonintoj, prezentantaj unu trionon de la asocioj. — La kunveno ĝenerala organizas ankaŭ la bezonajn sekciojn laborajn.

XIII. En la okazo de la finiĝo de la I. A. I. decidis la ĝenerala kunveno pri la uzo de la havo (kapitalo).

Dum la dua kunsido (merkredo, 19. VIII.) prezidis Dro E. Boirac kaj poste prof. Maréchal. Sekretario dum la kunsido: Th. Ĉejka. — En tiu ĉi kunsido estis elektita la komitato de la I. A. I. kaj ĝia estraro (prezidanto, 3 vicprezidantoj, sekretario, kasisto) La elektita komitato estas: *Dro E. Boirac*, rektoro de la universitato el Dijon en Francujo (honora prezidanto), *Théophile Cart*, profesoro de la universitato en Paris (prezidanto), *F. Maréchal*, profesoro el Leeds en Anglujo, *frl. de Chalnet* el Haag en Nederlando kaj *Romano Frenkel*, inspektoro de gimnazio el Niŝejsk en Siberio (vicprezidantoj), *F. Durieux*, direktoro de lernejo el Lille en Francujo (sekretario), *Theodor Ĉejka*, instruisto el Bystrice-Hostýn en Moravio (kasisto), *F. Avilov*, estro de reala lernejo el Kars en Rusujo, inĝ. *Everardo Backheuser*, profesoro de politeknika lernejo el Rio de Janeiro en Brazilio, *Dro W. Clark* el Arborfield en Anglujo, *K. Schönherr*, instruisto el Dresden en Germanujo kaj *Otto Simon*, profesoro de gimnazio el Wien en Aŭstrio. — Poste sekvis longaj diskutadoj pri la „Internacia diploma de kapableco instrui Esperanton“. Fine oni deklaris, ke decidi la aferon ne apartenas al la I. A. I., ĉar la diskutita demando staras ekster la kompetenteco de la I. A. I.

Pri la tria kaj kvara kunsidoj (vendredo, 21. VIII. kaj sabato, 22. VIII.) raportas sube la sekretario de la I. A. I. s-o F. Durieux.

Th. Ĉejka.

*

Speciala kunveno de la Internacia Asocio de Instruistoj.

Prezidas prof. Maréchal, raportas F. Durieux, la kunvenon aranĝis K. Schönherr. Ĉeestis ĉirkaŭ 170 ĝeinstruistoj. La tagordo: I. Parolado de F. Durieux (Francujo) pri Esperanto en la lernejo. II. Praktika leciono pri Esperanto de K. Schönherr (Germanujo). III. Pri maniero instrui Esperanton al nenion sciantaj de F. Maréchal (Anglujo).

I. Parolado de s-o Durieux. La parolado de s-o Durieux estis grava kaj preskaŭ oficiala, ĉar lia kompetenta estro skribe aprobis la tekston. Li diris, ke homo, kies metio estas forĝi spiritojn, neniam estos perfekta laboristo, se ĝi konas nur sian propran spiriton, eĉ se ĝi nur konas sian nacian spiriton. S-o Durieux parolis ankaŭ pri la pedagogia valoro de Esperanto por instrui naciajn lingvojn kaj montris rezultatojn atingeblajn en knaba klaso, kie, kiam eble, la instruisto parolas Esperanton. Fine li detale klarigis la organizadon de la esperanta instruado en la oficialaj lernejoj de sia urbo Lille.

II. Leciono de s-o Schönherr. S-o Schönherr faris lecionon tre aplaŭditan post finiĝo. Li uzis muran bildegon laŭ la metodo de Delmas. Tre praktike, paroliginte la infanojn, li montris bonan manieron doni lecionon. Aplauĉdadoj montris al s-o Schönherr, ke la ĉeestantoj lin dankas pro iniciativo, intereso, utilo.

III. Leciono de s-o Maréchal. S-o Maréchal kun rimarkinda facileco montris, kiamaniere oni povas uzi la metodon de Gouin kontraŭ lernantoj, kiuj scias nenion pri Esperanto.

Post tiuj lecionoj komencis interesa diskutado pri diversaj metodoj kaj procedoj instrui Esperanton, nome pri la plej bona maniero meti demandojn al infanoj. En tiu diskutado partoprenis s-oj Warnier (Paris), Nerson (Paris), Maréchal (Anglujo), Germain (Francujo), Fischer (Rumanujo), Schönherr (Germanujo), Frenkel (Siberio), Durieux (Francujo) kaj aliaj, kies bedaŭrinde nek nacieco nek nomo estas konataj de la sekretario.

S-o Warnier, ekzemple, demandis, kial oni ne metas la demandojn rekte nur al unu lernanto. S-o Durieux diris: Jen estas kiel oni faras ĉe ni. La instruisto metas ĝeneralan demandon. Li lasas momenteton por pripensi kaj demandas: „Kiu scias?“ La sciintoj levas manon kaj nur tiam la profesoro montras la respondanton. Tiel ĉiuj infanoj estas instigataj atenti la lecionon. — Tiu farmaniero ricevis plimultan aprobon. — S-o Frenkel rimarkigis, ke la ĵus faritaj lecionoj montras facilecon de Esperanto. La infanoj kvazaŭ sentas la spiriton de la lingvo. Rimarkinde estas, ke ili ne faris eraron en la uzado de l'akuzativo.

Aliaj fakoj. S-oj Deshays kaj Nerson petis, ke oni legu la decidon de la antaŭa kunsido de instruistoj pri „Internacia diplomo“. Tiun decidon oni ne legis en la lasta Agada kunsido. Eble la ĉeestantoj kredas, ke ne estas akordo inter la instruistoj kaj la aliaj profesoroj de Esperanto, kiuj preskaŭ ĉiuj deziras internacian diplomon. Oni decidis, ke s-o Maréchal klarigu en la venonta Agada kunsido, ke I. A. I. ne estas kontraŭ la Universala Esperanto Asocio (U. E. A.), kiu deziras starigi internacian ateston. — S-o Clark (Anglujo) parolis longe pri tiu demando. Fine oni akceptis la jenan deklaron, proponitan de s-o Frenkel kaj transdonitan ĉe la sekvinta Agada kunsido: „La I. A. I., kiel profesia societo restas ekster la demando pri la „Instituto Internacia“ kaj ripetas sian unuan deklaron. Tamen, ĉar la internacia diplomo estas alprenita de la kongreso, ni kiel esperantistoj, devas submetiĝi al ĝia decido. La I. A. I. ne estas kontraŭa al Instituto, sed esprimas la deziron, ke neniu instituto havu monopolon en la aljuĝo de la diplomoj“. (Aprobata ĉiuvoĉe).

Fine s-o Ĉejka, kasisto, kolektis kotizaĵojn (1 Sm. por 1 jaro) de asocioj. Pli ol 70 tuj pagis. Oni decidis antaŭ disiĝo, ke la unua kajero de la perioda „Internacia Pedagogia Revuo“, oficiala organo de la I. A. I., eliru kiel eble plej baldaŭ. S-o Ĉejka estis komisiita per la direktado kaj eldonado de la „I. P. Revuo“.

F. Maréchal,
prezidanto de la kunsido.

F. Durieux,
sekretario.

Membroj de la I. A. I., kiuj aliĝis ĝis la 10. XI. 1908 kaj pagis la kotizaĵon 1 Sm. por unu jaro (escepte la honorajn

membrojn s-oj Dro Zamenhof kaj Dro Boirac): 1. S-o Cart, Franc., 2. Frenkel, Siberio, 3. Maréchal, Angl., 4. Durieux, Franc., 5. Čejka, Moravio, 6. Simon, Aŭstrio, 7. Krumpholtz, Mor., 8. Grňa, Mor., 9. Holub, Mor., 10. Otruba, Mor., 11. Jovanovič, Serbujo, 12. Jelínek, Boh., 13. Zlatník, Boh., 14. Drudin, Fr., 15. Rockmann, Germ., 16. frl. Bonnet, Fr., 17. s-ino Guivy, Fr., 18. Backheuser, Brazilio, 19. Maresquelle, Fr., 20. Tétaud, Fr., 21. Schwarz, Boh., 22. Fricke, Germ., 23. Caron, Fr., 24. Laŭrenti, Ital., 25. B. Böttcher, Germ., 26. Lueders, Usono, 27. Schönherr, Germ., 28. Ökland, Norveg., 29. s-ino Schafer, Angl., 30. frl. de Chalnet, Nederl., 31. Gartelmann, Germ., 32. Pudritzki, Germ., 33. Dro Nitz, Germ., 34. Dro Clark, Angl., 35. Stuart-Menteath, Angl., 36. Pointer, Angl., 37. Čížek, Boh., 38. Gill, Angl., 39. Bonnet, Fr., 40. Fischer, Ruman., 41. frl. Thorpe, Angl., 42. Hammarlund, Sved., 43. Bickell, Angl., 44. Koziara, Polujo, 45. Cayeux, Fr., 46. Osw. Böttcher, Germ., 47. Böhme, Germ., 48. Glück, Aŭstrio, 49. frl. Lawrence, Angl., 50. Jeníček, Boh., 51. Combet, Tuniso, 52. frl. Roux, Fr., 53. Medgyesi, Hungario, 54. Deligny, Fr., 55. A. Germaine, Fr., 56. Avilov, Rus., 57. Nerson, Fr., 58. Fafet, Fr., 59. H. Germaine, Fr., 60. Dro Kabanov, Rus., 61. Dro Rohrbach, Germ., 62. Browne, Angl., 63. Richardson, Belg., 64. Bezděk, Mor., 65. Maxwell, Skotlando, 66. Satterley, Angl., 67. Beuve, Fr., 68. Deshays, Fr., 69. frl. O'Brien, Angl., 70. Dro Mouton, Fr., 71. s-ino Durieux, Fr., 72. Benoit, Fr., 73. s-ino Marsat, Fr., 74. s-ino Baudelle, Fr., 75. frl. Richez, Fr., 76. frl. Leprêtre, Fr., 77. Alferi, Boh., 78. Mazzolini, Ital., 79. Lundqvist, Sved., 80. Kaszycki, Galicio, 81. Anfroy, Fr., 82. Tenora, Mor., 83. frl. Delannoy, Fr., 84. Inge-laere, Fr. 85. Gluchoski, Polujo.

Internacia oficejo por instruantoj de Esperanto.

Laŭ la propono de s-o H. Fischer el Galatz (Rumanujo) la kunvenintaj subskribintoj organizis internacian oficejon por instruantoj de Esperanto, kies agado estos interŝanĝo kaj interdiskutado pri la manieroj uzataj de diverslandanoj en la instruado: agado farota kun la bonvole promesita subteno de Dro L. Zamenhof.

La nun fondita „Internacia Asocio de Instruistoj“ volas korespondadi kaj diskutadi pri ĉiuj profesiaj fakoj ekz. matematiko, hemio, pedagogio ktp., uzante la lingvon Esperanto kiel interkompreniĝilo kaj havante ankaŭ fakon por la instruado de Esperanto al infanoj kaj gestudentoj de publikaj lernejoj.*

La „Internacia Instituto de Esperanto“ (I. I. E.), fondita de s-o Privat, celas starigon de normalaj lernejoj de Esperanto, preparadon de specialaj instruistoj por Esperanto kaj eldonon de atestoj pri kapableco.

Mankis ĝis nun, en la grava tempo de propagando, ilo por la granda aro de instruantoj, kiuj ne estas profesiaj instruistoj, sed

* S-o sekretario ĝis nun ne havis okazon legi la regularon de la I. A. I. kaj tial lia raporto en kelkaj punktoj, kiuj rilatas al I. A. I., estas iom erara. —
Rim. de la red.

korege volas kunlabori en la disvastigo de nia lingvo; ilo, kiu obligos al ili informi sin pri la plej bonaj manieroj de instruado aŭ pri maniero de klarigo de iu parto de la gramatiko ktp. Tiu ĉi ilo volas esti la nun fondita „*Internacia Oficejo de la Instruantoj de Esperanto*“ (I. O. I. E.). Sed tiu ĉi Oficejo ne estos societo kun speciala estraro kaj regularo, nur akceptejo kaj transdonejo de ricevitaj demandoj kaj de kolektitaj respondoj. La aro de la anoj mem estos la Oficejo, kies reprezentantoj laboros nur por ebligi la plej rapidan interŝanĝon de la demandoj kaj respondoj.

La organo de la Oficejo estos la gazeto de la I. A. I., kiu bonvole rezervos por niaj demandoj, cirkuleroj ktp. specialan fakon.

Ĉar la tuta agado de la Oficejo estos farata de la anoj mem, oni ne bezonos grandan budĝeton kaj oni fiksis kiel jaran kotizon nur $\frac{1}{2}$ Sm. kiel antaŭpago por la necesaj elspezoj. Nature nur la anoj, kiuj pagis tiun ĉi kotizaĵon, estas rajtigitaj fari demandojn kaj proponi diskutadojn pri la maniero de instruado. Por ebligi al la Oficejo labori tre rapide, la tasko estas partigita tiamaniere, ke ekzistos unu Centra Oficejo por Eŭropo, Azio kaj Afriko, alia Oficejo por Ameriko kaj Aŭstralio (Oceanio).

La oficestraro konsistas el s-o H. Fischer, Galatz (Rumanujo) por Eŭropo, s-o Lewis B. Lueders, Philadelphia (Penna, U. S. A.) por Ameriko kaj s-o Julius Glück, Wien VI./1, Dürergasse 19 (Aŭstrio) kiel sekretario por la korespondado kaj klarigo al interesuloj ktp.

Inter la anoj troviĝas: rektoro Boirac, prof. Cart, Grabowski, Dro Bein, prof. Bourlet, G. Moch, R. de Saussure, H. F. Höveler, E. Privat, prof. O. Simon, red. J. Schröder, Dro Mybs, Dro Kroita, pastro Schneeberger, F. Hodler, Dro Schramm, Th. Čejka k. a.

Laŭ la invito de s-o Privat la Oficejo delegis sian anon prof. Cart por raporti al la „Internacia Instituto de Esperanto“ pri la agado de la nun fondita Oficejo. Laŭ tiu ĉi raporto povas la I. A. I., la I. I. E. kaj la nun fondita I. O. I. E., kunlaborante kaj subtenante sin reciproke, helpi bonege la disvastigon de la lingvo internacia per instruado, ĉiu irante sian vojon, sed tamen celante la samon: pligrandigo de la esperantistaro. Dum ĉiu kongreso oni aranĝos diskutadojn pri diversaj manieroj de instruado kaj certe tiu ĉi interŝanĝo helpos multe la perfektigon de tiu ĉi ĝis nun ankoraŭ ne sufiĉe prilaborita fako.

H. Fischer, estro por Eŭropo. *Lewis Lueders*, estro por Ameriko.

Julius Glück, sekretario.

Literaturo.

Fr. Heger: *Tipoj de eŭropaj nacioj*. Eldonis Ed. Hölzel, Wien 1908. Prezo 20 K (8.33 Sm). — La konata firmo eldonista kaj artista Ed. Hölzel en Wien (Aŭstrio) eldonis por lerneja bezono la grandan atlason „*Tipoj de eŭropaj nacioj*“, pri kiu diras prof. J. Matiegka („*Pedagogické Rozhledy*“): Hodiaŭ oni jam ne povas

la eŭropajn naciojn portretigi ĝenerale per unu sola bildo „Ariano“ aŭ „Indoeŭropano“, kiel oni ĝis nun kutime faris, kaj por karakterizi la apartan nacion nun jam ne sufiĉas preni sole unu „tipon“. Jam en la tempo prahistoria ekzistis en Eŭropo kelke da tipoj gentaj; poste per la nova migrado de nacioj kaj per la konstanta, miljara intermiksado la cirkonstancoj etnologiaj en Eŭropo ankoraŭ plu komplikiĝis. Nur la antropologiaj esploroj dum la lastaj 50 jaroj bone klarigis tiujn komplikitajn cirkonstancojn. Ĝis nun ni ne havas resuman kaj facile atingeblan publikaĵon pri la etnologio de Eŭropo; kaj tamen estas bezone, ke oni povu havigi ankaŭ al lernantoj kaj al pli larĝa rondo de la publiko per taŭgaj helpiloj la klaran kaj ĝustan bildon. Tial estis malfacila, sed meritplena laboro, kiun entreprenis la firma Ed. Hölzel, kiam ĝi eldonis sub la redaktado de la registara konsilanto Fr. Heger la verkon „Tipoj de eŭropaj nacioj“. Tiu ĉi fama specialisto akiris per siaj studoj kiel direktoro de la antropologia-folklorista sekcio ĉe la kortega muzeo en Wien kaj per siaj vojaĝoj tra ĉiuj partoj de la mondo tiujn spertojn, kiuj estas bezonaj por sukcesa efektivigo de tia verko. La akademia pentristo B. Beck faris la originalajn akvarelojn kaj la firma Hölzel la polikroman, artiste faritan reproduktion. La verko enhavas sur 4 tabuloj (grandeco 73 × 98 cm) 32 karakterizajn reprezentantojn de diversaj eŭropaj nacioj. La aŭtoro ekkonis, ke per pli malgranda nombro da tipoj oni ne povas doni almenaŭ iom plenan impreson. La unua tabulo vidigas la naciojn precipe de lingva grupo romana, la dua germana, la tria slava kaj la kvara la pli izolitajn naciojn ceterajn. Francoj estas reprezentitaj per 3, italoj per 2, germanoj per 3 tipoj ktp. El slavo estas reprezentitaj apud ĉeĥo (bohemo) ankaŭ slovakoj, poste poloj, malgrandrusoj, blankrusoj, grandrusoj, montenegroj kaj bulgaro . . . La elekto de la tipoj estas farita kun helpo de diversaj sciencaj institutoj kaj fremdaj specialistoj. Ĉe tio la aŭtoro iris laŭ ambaŭ science akcepteblaj vojoj: aŭ estis elektitaj la karakterizaj vizaĝoj de pli junaj personoj (30–40-jaruloj), kiuj iel vidigas la plej disvastigitajn signojn inter la popolo vilaĝana (ne urba!); aŭ estis uzita iel „meza“, laŭ la antropologie pruvitaj signoj komponita portreto (ekz. la tipo de „basko“ laŭ la komponaĵo de prof. Telefor de Aranzadi). La konciza teksto donas la plej bezonan klarigon. La bildaro kaj klarigo estis eldonitaj en kelkaj lingvoj. — *Th. Ĉ.* (Rim. de la redakcio: Kiu dezirus ricevi la verkon, sendu la monon al nia redakcio kaj ĝi jam zorgos pri la mendo).

Revuo de Revuoj.

Pedagogické Rozhledy. (Pedagogia Revuo). Ĉeĥa (bohema) scienca revuo pedagogia, redaktata de universitata prof. Dro Fr. Drtina kaj aro da redaktoroj specialaj. Jaro XII, Nro 1-a, oktobro 1908, 104 pĝ. de leksik. form. — Eldonas „Dědictví Komenského“, societo de ĉeĥaj instruistoj por eldonado de verkoj pedagogiaj en Praha, Bohemujo. — ENHAVO: Artikoloj fundamentaj: Prof. *Fr. Krejčí*: La filozofio de L. N. Tolstoj. Prof. *K. Velemínský*: La revoluciulo en la pedagogio (al 80-a naskiĝtago de L. N. Tolstoj). Inspektoro *J. Pešek*: La praktika studo de la me-

todiko. *R. Sokol*: Fiziko energetika. Literaturaj analizoj: Biblioteko de pedagogiaj klasikuloj (redaktata de prof. Drtina). IV. Verkoj de Comenius II. de *Aug. Krejčí & J. V. Novák*. — *Gebaurová, Jiráček, Reitler*: Lernolibro de historio por elementaraj lernejoj superaj. *Fr. Bednář & L. A. Hrázděra*: Teorio kaj metodiko de stilo produkta. *Fr. Heger*: Tipoj de eŭropaj nacioj. *E. Ledrer*: Geometrio por lernejoj metiaj. *Dro Heckmann*: Pri la koncentrado en la instruado. *L. Dlustuř*: La edukado ĉe antikvaj grekoj. *Fr. Walter*: Die sexuelle Aufklärung. *W. Rein*: Deutsche Schulerziehung. *W. H. Möller*: Die päd. Presse. Eduko nacia: Antaŭparolo de J. Černý. Lernejoj en landoj slavaj: *St Klíma*: La instruado ĉe slovakoj. Eduko religia: *E. Havelka*: Antaŭparolo. *St. Klíma*: La religio kiel rimedo edukada. Eduko estetika: *K. Wellner*: Mikuláš Aleš, pentristo ĉeĥa. — Monografioj: *J. Klíma*: Praktiko de la eduko estetika. *L. Gurlitt*: Schule u. Gegenwarts-kunst. Pedopsikologio: *V. Müller*: La observado de infanoj en la 1-a klaso de lernejo ekzerca. *J. Chudáček*: La pedopsikologia literaturo itala. — Monografioj: *R. Gaupp*: Psikologio de infano. *H. Dekker*: Naturgeschichte d. Kindes. *T. Jonckheere*: La science de l'enfant. *M. Verworn*: Zur Psychologie d. primit. Kunst. *H. Weimer*: Der Weg zum Herzen des Schülers. Pedopatologio: *Ch. Herfort*: Enkonduko al la studo de infanoj imbecilaj. *J. Mauer*: Zorgado pri infanoj imbecilaj en Ameriko. *Dro Kaufmann* pri la edukado de infanoj imbecilaj. *L. Miklas*: Die Hilfsschule. Zorgado pri la infanaro: *H. Minařík*: Kongreso de konsilantaroj por orfoj en Moravio. *J. Zeman*: La ekspozicio en Kroměříž. Landa komisiono por la zorgado pri infanoj. *M. Alden*: Child life and labour. Zeitschrift für Krüppelfürsorge. Higieno lerneja: *V. Hüttel*: Influo de lernejo je la sano de infanoj. *A. Valenta*: Benkoj lernejoj II. — Monografioj: *Best*: Kurzsichtigkeit. *G. Poelchan*: Anleitung f. d. schulärztliche Tätigkeit. Revuo de gazetoj: Zeitschrift f. pädag. Psych., Pathol. u. Hygiene. — Monatschrift für höhere Schulen. — Škola našeho venkova. Notoj kaj informoj: Bulteno de „Dědictví Komenského“ („Heredaĵo de Comenius“, societo de ĉeĥaj instruistoj por eldonado de verkoj pedagogiaj. Ĉiujara kunveno). — „Jednota Komenského“ („Unio de Comenius“, societo por la reformado de lernejoj). — Prof. Fr. Krejčí (al 50-a naskiĝtago). — Jul. Paulus (†). — Kongreso de slavaj instruistoj en Praha. — Kurso de manlaboroj. — Ĉeĥa leksikono pedagogia. — Alvoko de la „Unio de Comenius“).

Th. Č.

*

Pro manko de spaco ni devis prokrasti multe da interesa materialo por la kajero venonta.

La redakcio.

kaj dubas pri miaj vortoj, se mankas al mi la dokumentoj, per kiuj mi povus nerefuteble **pruvi** tion, kion mi parolas. — Prezentu al vi mian propagandon, se mi povas diri al miaj gekolegoj (ekz. en la kunveno): »Vidu, miaj gekolegoj, antaŭ kelkaj momentoj mi ricevis la 1-an Nron de »Internacia Pedagogia Revuo«, organo de la I. A. I. La revuo estas redaktata en Esperanto. Diversnaciaj kolegoj verkas por ĝi artikolojn pri diversaj temoj, kiuj koncernas mian profesion. Ili traktas en siaj artikoloj la demandojn, kiuj nun plej multe okupas la tutmondan familion geinstruistan. Krom tiuj artikoloj informaj vi vidas tie ĉi la artikolojn pri gravaj demandoj pedagogiaj, skribitaj de la plej bonaj specialistoj diversnaciaj. La revuo enhavas ankaŭ riĉajn ekstraktojn el ĉiunaciaj gazetoj pedagogiaj, kiujn verkis diversnaciaj kolegoj mem. En la fako »Korespondado« unu kolego el aŭstria pejzaĝo alpa proponas al kolego angla, ke li povas en lia hejmo pasigi senpage someran libertempon, se la angla kolego faros al li la samon en la jaro venonta. Kaj jen unu kolego el malriĉa vilaĝeto en norda kaj montara parto de Norvegujo petas siajn gekolegojn el landoj pli sudaj, ke ili sendu al li interesanĝe por la malriĉaj kolektaĵoj de lia lernejo diversajn skarabojn, papiliojn, mineralojn kaj aliajn naturaĵojn, kiuj estas multaj kaj preskaŭ senvaloraj en iliaj landoj, sed ne tiel por landoj nordaj. Karaj gekolegoj, ĉu vi ankoraŭ pensas, ke Esperanto estas la afero por instruisto tute senvalora kaj neutila? k. t. p., k. t. p. . .«

— Mi estas certa, ke mi vekos tiamaniere en multaj kolegoj scivolon kaj veran intereson por nia afero kaj ke ili fariĝos pli favoraj al Esperanto kaj pli emaj aliĝi al ni. Ĉu vi ne kredas? Ne kedu, sed **provu!** — Sed kiel aranĝu la aferon kolego tro juna aŭ tiu, kiu ne estas elokventa oratoro? Tre simple! Li skribu pri la samaj aferoj en la naciaj gazetoj, kiuj estas plej multe legataj de geinstruistoj. Kaj se mi ne scias verki la propagandajn artikolojn? Nu, tiam vi certe scias almenaŭ traduki diversajn artikoletojn el la revuo, pri kiuj vi pensas, ke ili povus esti interesaj por viaj gekolegoj. Sed en tiu ĉi okazo vi neniam forgesu fari la rimarkon, ke la artikolo estas tradukita el la esperanta revuo, kiu estas oficiala organo de la I. A. I. (kies jara kotizaĵo estas . . . diru vialandan monon, kaj kiun oni sendas al . . .), kiu estas redaktata de diversnaciaj kaj diverslandaj instruistoj k. t. p. El la 1-a Nro por la propagando estas plej taŭga la artikolo pri la I. A. I. Kiu ne sciis skribi ĝin resume (mallonge), tiu nur bezonas sendi al mi poŝtmarkon por la respondo kaj mi tuj sendos al li pretan artikolon, kiun oni bezonas nur traduki en sian nacian lingvon kaj sendi al la redakcio de sialingva gazeto. — Karaj gekolegoj, kiu el vi ne povus propagandi nian aferon almenaŭ **unumaniere**? Mi kredas, ke plimulto de vi faros tion **ĉelumaniere** kaj tiam la celo estos trafita plej certe!

Al via propagando deziras plenan sukceson via kolego
Th. Čejka.

NB. Kompreneble, mi ĉiam kun granda plezuro akceptos la sciigojn pri viaj sukcesoj (se eble kun i ekz. de la presita dokumento!), kiujn vi atingis inter viaj samnaciaj gekolegoj. Kaj se vi scias ankoraŭ alian efikan manieron de propagandado, sciigu ĝin tuj per nia »telefono« al viaj aliaj kolegoj. Nuna tempo estas la tempo de propagandado! **Do ni propagandu!!**

Adresaro de instruistoj kaj profesoroj.

Ni preparas por eldono a) Tutmondan Adresaron de geinstruistoj kaj geprofesoroj profesiaj kaj b) Tutmondan Adresaron de neprofesiaj geinstruistoj-esperantistoj. Tial ni petas ĉiujn, kiujn koncernas tiu ĉi afero, ke ili respondu al ni en ilia propra intereso la jenajn demandojn: 1. Via detala adreso: a) s-ro, s-ino aŭ f-ino? b) nomo familia kaj alnomo? c) profesio? d) urbo aŭ vilaĝo? e) strato? f) Nro de loĝejo? g) provinco, departemento, gubernio? h) lando? — 2. Nacieco? — 3. Al kia kategorio apartenas via lernejo? — 4. Kiujn objektojn vi instruas (demando precipe por fakaj aŭ specialaj instruistoj)? — 5. Kuu gekolegoj el kiuj nacioj aŭ landoj vi deziras korespondi? — 6. Pri kio? — 7. Al kiu kaj per kio vi povas esti precipe utila? — 8. Speciala deziro. — **La respondojn skribu** sur ordinaraĵ poŝtkartoj (tion ni deziras pro teknikaj kaŭzoj). Ripeti la respondojn ne estas bezone; sufiĉas skribi la ciferon de la demando. — Ĉiuj enskriboj kaj sciigoj por la Adresaro estas **tute senpagaj**. — Ĉion sendadu al la red. de **Int. Ped. Revuo**.

Ekzemplo I-a (prenita el efektivaĵo): 1. S-o Krump-holz Josef, instruisto, Bystřice-Hostýn, str. Komenského, Nro 514, Moravio, Aŭstrio. — 2. Ĉeĥo (bohemo). — 3. Publika lernejo elementara (5 klasoj). — 4. En mia klaso ĉiujn. — 5. Kun kolegoj de slavaj kaj germanaj nacioj, kuu japanoj. — 6. Bohemaj (kaj moraviaj) »fratoj«, puritanoj, buddhanoj. Pri Comenius. Religio kaj lernejo. — 7. Al tiuj, kiuj ne scias lingvon ĉeĥan aŭ germanan ebligi kaj faciligi libertempan loĝadon en la mineralakva kaj klimata banurbo Luhačovice (en Moravio). — 8. Kolektas ilustritajn lernolibrojn de geografio. Deziras ricevi tradukojn de geografiaj artikoloj pri la imperio Aŭstrio-Hungario (el diverslingvaj lernolibroj de geografio).

Ekzemplo II-a: S-o Hansen C. W., profesoro, R . . kjöbing, str. Noerebrogade, 33b, Danujo. — 2. Dano. — 3. Gimnazio. — 4. Geografio, hŝtorio. — 5. Gekolegoj bulgaraj, polaj, slovakaj, italaj, hispanaj, ĥinaj. — 6. Lerneja higieno. Elfosaĵoj en Babilono kaj Malgranda Azio. Vojaĝado kun lernantoj. — 7. Tradukoj el danaj gazetoj pedagogiaj kaj historiaj. — 8. Pasigi libertempon en Anglujo aŭ Hispanujo, en Kaŭkazo aŭ Mezo-potamio.

*

Redakcio kaj administracio de la I. P. R. troviĝas en *Bystřice-Hostýn, Moravio, Aŭstrio*. — Jara abono por ne-membroj de la I. A. I. = r.5 Sm. Oni pagu per poŝta mandato aŭ ĉeko. — Poŝtaj markoj *ne estas* akceptataj por la pago de l' abono aŭ membra kotizaĵo.

Avizoj de la redakcio. Nepresitaj manuskriptoĵ ni re- sendas nur tiam, se oni aldonis necesan poŝtpagon por la re- sendo. — La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭ be- zono la manuskriptoĵn. Represoj kaj tradukoj de niaj ar- tikoloj estas permesataj, se ili ne estas speciale rezervitaj. Sed oni ĉiam citu nian revuon kaj sendu al ni, se eble, almenaŭ 1 ekz. de la tradukaĵo aŭ represaĵo. — En la fako »Bibliografio« estos registrataj sole tiuj libroj aŭ gazetoj, kiuj venis en 2 ekz. Recenzataj estos tiuj verkoj (en kiu ajn lingvo), kies en- have koncernas nian programon. — La redakcio respondas le- tere aŭ poŝtkarte nur tiam, se oni aldonis por la respondo poŝtan markon, bileton aŭ karton.

